

20-a Jaro N-ro 213-214: Oomoto, KAMEOKA, Kioto-hu, Japanujo. **Marto-Apr. 1958**

Abonprezo: ¥ 240 por unu jaro; \$ 0.80 aŭ 12 Steloj por eksterlando: Abonebla ĉe la Internacia Esperanto-Instituto, Rionuestraat 172, Den Haag, Nederlando

Potencia Marŝado de Mondfederacia Standardo en Japanujo

La Mondfederacia Movado en Japanujo faras stabilajn paŝojn precipe inter la magistratoj, kaj la nombro de la mondanigitaj urboj montris saltan indikon en la tempo ĵus antaŭ la 3-a Azia Kongreso de Mondfederalistoj, kiu okazis en okt., 1957. Tiu ĉi antaŭeniĝo de la Movado ne estis hazarda, nek efemera: la movado plue progresis kaj ankoraŭ nun vigle progresas. Kiel oni legos en ĉi tiu numero, la nombro de la mondanigitaj japanaj urboj jam atingis 100⁺, kaj tiu de la mondanigitaj prefektujoj atingis 6. Se oni konsideras, ke la tuta nombro de la japanaj urboj estas 2,355, la cifero atingita ankoraŭ ne estas granda, sed ĝi jam estas sufiĉa por promesi al ni la nepran atingon de nia celo: *mondanigo de Japanujo en la tuta amplekso de la stato*.

Krom la mondanigo de urbaj unuoj, aparte rimarkinda estas la Movado inter diversaj organizaĵoj kaj grupoj: profesiulaj, laboristaj, junulaj, junulinaj, kooperativaj k. a., kiuj faris publikan Deklaron por subteni la Movadon de Mondfederalismo. Ili nombriĝas je pli ol 30. Per tio ĉi oni povas konstati, ke la Mondfederacia Movado en Japanujo jam tendencas pli kaj pli enradikiĝi en la popolamason.

Bona aŭspicio en tiu direkto jam montriĝis ankaŭ en la japana ĵurnalismo, ĉar pli kaj pli multaj ĵurnaloj pritraktas la Mondfederalismon kaj popularigas ĝian Idealon per favoraj opinioj. Ekz-e, antaŭ nelonge unu el la plej gravaj taggazetoj de nia lando publikigis ĉefartikolon, en kiu oni faris rimarkindan aserton, ke jam venis la tempo, kiam la japana registaro kuraĝe kunportu la Standardon de Mondfederalismo, subtenante ĝin kiel ŝtat-principon.

Estas ja emociplene, ke la torĉo de la Urbo-mondaniga Movado, kiu startis en Ajabe antaŭ 9 jaroj, baldaŭ vekos la tutan japanan popolon kaj la tutan homaron!

Red.

GVIDILO PRI DIA VOJO

de Onisabro Deguĉi

1. Ĉiuj homoj de la mondo estas la gefiloj en la okulo de Dio, kaj ili estas la gefratoj en la okulo de la homoj.
2. Dio estas Spirito nevidebla kaj senvoĉa, kaj tial Li posedas puraniman homan korpon por malkovri ĉion necesan al la homaro.
3. Eĉ Satano timas Dion; la timo al Dio sole ne formas la bazon de kredo.
4. Ne nur timi Dion, sed ankaŭ intimiĝi kun Li estas la inicilo je la kredo de tiuj, kiuj vere servas por Lia Vojo.
5. Demonoj estas tiuj homoj, kiuj plendas sian sorton kaj blasfemas Dion apenaŭ malfeliĉo trafas ilian familion.
6. Kiam malfeliĉo trafas vian familion, vi estu brava, purigu vian koron je pekoj kaj krociĝu al Dio. Dio deziregas doni pretan helpon al ĉiu, ĉar ĉiu ajn el la homaro estas Lia amata filo aŭ filino.
7. Dia Vojo ne estas tiom fora, kiom ŝajnus al vi, nek ĝi estas tiom proksima, kiom ĝi aperus al vi.
8. Nepre plenumu kion vi unu fojon juris je Dio, ĉar al la fidelulo Li pagos per rekompenco milobla.
9. Kiu strebas servi por Dia Vojo ĉiam preĝu, ke liaj servoj ne estu vidataj de aliaj.
10. Kion ajn homo klopodu elfari, en tio li neniam sukcesus se liaj agoj malplaĉus al Dio.
11. La *Sinnjo* estas la senpera Peranto inter Dio kaj homoj; nenio estos aŭskultita en ĉielo krom se ĝi estas perita de li.
12. Kies koro estas pekvualita, tiu ne povas vidi Dion, same kiel oni ne povas vidi la sunon aŭ la lunon en nubozia ĉielo.
13. La Dio, kiu kreis la tutan universon, estas nur Unu; Li nomiĝas *Ame-no-minakanuŝi*.
14. Dio kreis ĉion en la universo tial, ke Li estas Ĉiopova.
15. Dio naskigis la Anĝelojn de Ĉielo kaj Tero por ke ili okupiĝu en la administrado de ĉio en la universo.
16. La Anĝelo *Susano-o* estis sendita sur la teron kiel la Savanto de la mondo en la pratempo. Li elacētis la homaron prenante sur sin ĉiujn pekojn ĉielajn kaj terajn. Sed la plej granda honto estas ke ĉi tiu Savanto, la Anĝelo de Kompato estas erare interpretita en la japana mitologio kiel anĝelo de sovaĝa temperamento.

17. La Spirito de *Mizu* (Akvo) estas la Disendita Savanto de ĉi tiu mondo; kion ajn vi petos de li, tio estos donita al vi.

18. Kiam ajn vi preĝas al Dio, kiu estas Sankta Spirito, vi estu vera kaj sincera en la koro.

19. Tage kaj nokte Dio deziregas kiel disdoni sian benon kaj savon al ĉiuj homoj.

20. Dio denove sendis la Spiriton de Mizu sur la teron por elfari la savon de la homoj tra la mondo. Pekuloj venu al Li senprokraste kaj adoru Lin, kaj ili estos savitaj en la feliĉegon de la Regno de Ĉielo. Via saviĝo dependas de via kredo kaj ago.

21. Homa korpo ne estas propraĵo de homo, sed ĝi estas Dia donaĵo. Se vi deziras servi al Dio, oferu vin korpe kaj spirite, kaj preĝu por la bono de Dia Vojo kaj la tuta homaro.

22. Tiu ĉi Skribo estas la Arkeo de mondsavo, Apogilo de vivo kaj Nutraĵo de animo por ĉiuj homoj. Krom ĝi, neniu alia trezoro troviĝas en la mondo; ĝi restos tiel longe, kiel la mondo ekzistos.

23. La plej gravaj por tiuj, kiuj serĉas kredon, estas kuraĝo kaj eltenado. Sen ĉi tiuj via kredo nenion fruktodonos.

24. Ekzistas nur Unu Dio; ĉiuj "dioj", kiuj ekzistas, estas la Anĝeloj servantaj al Dio kaj ili estas Liaj senditoj.

25. Akvogutoj falantaj de sur arbofolioj povas eniri en oceanon finfine. Bruligita alumeto povas eĉ detrui grandan urbon kaj ĝin cindrigi.

26. Tial, faru bonan aferon kiel ajn malgrandan. Via rekompenco en ĉielo estos milobla, kiel milio semita en bona tero fruktodonos miloble.

27. Al la vera Dio, la Sinjoro de la tuta universo, plaĉas tiuj, kiuj estas veramaj kaj preĝas por la bono de la Homaro; Li kronos iliajn kapojn per eterna prospero.

28. Kiuj pro senkredo aŭ perdis aŭ nebuligis la spiriton de *Naohi* (Konscienco), tiuj personoj ne plu estas ĉirkaŭgarnitaj de sia spirita kaj korpa aŭroj.

29. Kial la homo ne povus disradii per tiaj aŭroj, se li estas kreita laŭ la Sankta Bildo, naskita en la mondo kiel manifestiĝo de Sankta Spirito, kaj destinata fariĝi servanto en la regno de Ĉielo kaj Tero?

30. La Anĝelo *Susano-o* estas la Spirito de Mizu, aŭ la Gardanĝelo, kiu protektas nin kontraŭ ĉia malbono; Li estas la Savanto de tiu ĉi mondo.

31. Kion ajn vi preĝas sincere kaj petas en la nomo de la Spirito de Mizu, tio estos aŭskultita de Dio, ĉar — kredantoj de Oomoto bone sci — la Spirito de Mizu estas la Disendita Peranto inter Ĉielo kaj Tero.

32. Dio ne povas doni Siajn benojn al tiuj, kiuj enhavas dubojn. Dolora angoro estos propra puno al tiaj homoj.

El la Nigra Libro

La plej terura de la teruraĵoj
estas la homo en sia vanteco.

Schiller

Ĉiuj homoj estas fratoj — en la teorio, en la kredolibroj. Sed levu por momento la vualon de la realo: ĉu vi ne vidas, kiel la homoj diskarnigas kaj kontraŭbatalas sin reciproke? Kie estas amo, interkompreno, frataj kuniro kaj kunago? Per kia genia fantazio la homoj elpensas la plej kruelajn detruigrimedojn!

Nigra libro de la homaro, malfermiĝu! Mi volas rerakonti unu el la plej teruraj ĉapitroj de la kulturhistorio. Kion la homoj ne inventis por ekspedi de vivo al morto krimulojn aŭ tiajn personojn, kiujn oni konsideris kiel krimulojn! Paĝoj de la nigra libro, viviĝu kaj rakontu!

La romanoj faligis krimulojn, kiuj meritas mortigon, de turoj kaj rokoj. Ŝtonumo estis kutima ĉe la judoj de la antikva tempo. Mortigado de homoj per soifo kaj malsato estis ordinara en Romo dum la imperiestro Tiberio. Ankoraŭ en la mezepoko oni ĵetis malfeliĉulojn, kiuj nenion malbonan faris, sed nur rezistis la rabadon, en malsatturojn, kie oni malrapide malsatigis ilin. Precipe pastrojn oni malsatigis, ĉar pro superstiĉo oni ne kuraĝis verŝi

ilian sagon. Dum la roma imperio oni ĵetis katenitajn krimulojn al rabobestoj por manĝo. Estis apenaŭ pli milda formo de ekzekuto, kiam oni permesis ilin sin defendi sen armiloj kontraŭ la bestoj, ĉar tio ofte nur plilongigis la ekzekuton.

Al rabpafistoj kaj ŝtelĉasistoj oni praktikis la teruran punon ligi ilin sur cervoj, kiujn oni lasis forkuri tra arbaroj, heĝoj kaj dornejoj, kie la malfeliĉuloj estis disŝirataj. Por liberiĝi de la nekutima ŝarĝo la cervo rulis sin en marĉoj kaj sur tero, mejlojn kuris rapidege, ĝis finiĝis la vivo kaj de la besto kaj de ĝia ŝarĝo.

Ĝis la 19-a jarcento restis la terura ekzekutmetodo de ensaka dronigo, kiun oni uzis precipe por sorĉistinoj kaj virinoj mortigintaj infanojn. Oni enkudris la kondamnitojn en sakojn — ofte kun hundoj, katoj aŭ ratoj, eĉ kun simioj — kaj ĵetis ilin en akvon. Sed dronigpuno estis farata ankaŭ sen ensakigo. En 1435 la bela Agnes Bernauer estis ĵetata en Danubon, kaj kiam ŝi naĝante venis al la bordo, la ekzekutisto per longa stango forigis ŝin, ĝis ŝi malaperis. Ankaŭ la sankta Nepomuk estis

ĵetata en Moldavon en la jaro 1392, laŭ ordono de la sangavida reĝo Venceslao en Praha.

Bruligpuno restis de la antikva tempo ĝis la 19-a jarcento. Famaj estis la torĉoj de Nero, la amasbruligado de herezuloj en Hispanujo kaj brulmortigo de sorĉistinoj. Ofte oni enkudris la kondamnitojn en bovhaŭtojn, foje oni pliakrigis la punon malrapide karbigante ilin, forbruligante unue la plandojn kaj poste iom post iom la tutan korpon. Tiel estis brulmortigata en Moskvo 1689 la freneza religia fanatikulo kaj "Princo de Dio", Quirinus Kühlmann. De Plutarko estas menciita speciale kruela ekzekutmaniero, kiu montras vere frenezan turmentemon. Oni trempis krimulon en mielon kaj en bruliga sunbrilo lasis lin al la muŝoj, kiuj mortturmentis lin. Ankaŭ en la nova tempo okazis tia kruela mortturmento en Kolonjo, kie grafo Bergo estis mortigata tiamaniere.

La antikvaj germanoj lasis ĉevalojn pieddispremi certajn krimulojn. Monfalsistojn oni bolis en kaldronoj kun oleo kaj vino. En la punsistemo de la juĝejordo de Karlo V troviĝis la pliakraj mortigmanieroj de pikmortigo per palisoj, rado, dronigo saka aŭ sensaka. Kurioza ekzekutmaniero estis jena; oni senvestigis la krimulon kaj sur libera kampo enterigis lin ĝis la kolo. Poste oni jungis al plugiloj kvar ĉevalojn,

kiuj nenion sciis pri plugado, kaj pelis ilin al la kapo de la enterigito, ĝis la plugila fero ĝin forŝiris. Terure kruela puno estis rimentrancado el dorso kaj aliaj korpopartoj. Tiu puno okazis 1589 al patrinmortiginto en Praha.

Kiel plej humanecan mortigmanieron oni konsideris jam en antikva tempo senkapigon. Grekoj kaj romanoj konis ĝin. Ankaŭ en la nova tempo, kiam oni uzis la plej kruelajn mortigmanierojn, ĝi estis ĉiam uzata por nobeluloj. Konradino, Frederiko el Aŭstrio, Petro de Kastilio, la edzinoj de Henriko VIII, Maria Stuart, Karlo I, Ludoviko XVI, Marie Antoinette kaj multaj aliaj kronitoj suferis tian ekzekuton, kiu, se ni pensas pri la amaslaboro de gilotinoj dum la franca revolucio, ankaŭ povas esti terure kruela. Unu el la plej teruraj ekzekutaj kruelaĵoj okazis la 28-an de marto 1757 al Damiens, kiu faris atencon kontraŭ la vivo de la reĝo Ludoviko XV. La haroj hirtiĝas, kiam oni imagas la fiaĵojn, kiujn oni elpensis kaj faris kontraŭ li. En la nokto antaŭ la ekzekuto oni torturis lin en terura maniero, kaj poste tiris lin al Grève-placo, kie oni donis al li du glasojn da vino por denove firmigi lin por la ekzekuto. Poste oni trapikis lian dekstran manon per la sama spado, kiun li levis kontraŭ Ludoviko. Post tio oni sur ardanta forno rostitis la manon, ĝis ĝi fariĝis stumpo. Tion farinte oni per fero fiksas la

malfeliĉulon al la planko kaj per ardantaj preniloj elŝiris karnon el diversaj korpopartoj. Samtempe aliaj ekzekutservistoj verŝis en la vundojn fanditan plumbon, varmegan oleon, vakson kaj sulfuron. Plie oni ligis kelkajn junajn ĉevalojn al la brakoj kaj piedoj de la turmentado por disŝiri lin. Tio ne sukcesis, kaj eĉ post duobligo de la nombro de ĉevaloj kaj post trikvaronhora laboro ĝi ne sukcesis. Tiam oni distranĉis liajn tendenojn kaj tiamaniere helpis. Fine oni ĵetis la restaĵojn sur brulŝtiparon.

En la 20-a jarcento la naci-socialista Germanujo kreis terorsistemon apud kiu paliĝas eĉ la inkvizicio. Koncerne socian kaj individuan liberon Germanujo troviĝis en la Malluma epoko. La germana popolo vivis laŭ la leĝoj de sovaĝuloj. Per perforto, furioza detruo, kruelo, persekuto kaj subpremo — en tiel granda skalo sen komparo en la historio — Germanujo reiris al regado de ĝangalo. La plej primitivaj kaj sangavidaj instinktoj de la homoj fariĝis leĝo de la lando. La liberdetruo de la germana popolo, en privata kaj profesia vivoj, faris el Germanujo lokon por fanatikuloj, kiuj emis senmoraligi la homaron. Multaj libroj estas skribitaj pri la vivo en la koncentrejoj, pri la likvidado de la judoj, pri senkompata persekuto kontraŭ ĉiu, kiu ne tutkore simpatiis kun Hitler. La homa memoro estas tamen mallonga. Ŝajne ni lernis

akcepti ne nur la malbelegan bombardon de civiluloj kaj la modernan murdomilitadon sed ankaŭ la amaran kaj senkredan oferbuĉadon de senkulpaj homoj en la ŝaŭmanta malamkaldrono de Germanujo. La hitleristoj konscie, intence forstrekis tiun limlinion, kiu dividas la homan mondon de tiu de la bestoj... Germanujo liberiĝis de ĉiuj konsciencaj skrupuloj, de ĉiu sento de honto kaj moralo, de ĉio propreca al kulturitaj homoj. La mondo vidis armeon de kanibaloj, staton de kanibaloj, sciencan de kanibaloj. Ili murdis milionojn kaj bruligis la malfeliĉulojn en la gasĉambroj de la kampejoj de degrado kaj morto.

La piedon de tute senkulpaj homoj oni brute batis per bastono de rustaj najloj. La piedoj ŝvelis, infekto de gangrena naturo estiĝis, kaj nur kelkaj homoj saviĝis de amputo. Komuna sperto de la malliberuloj estis, ke oni ĵetis brulantajn cigaredojn en la gorĝon. Aliajn loĝantojn de la koncentrejoj oni devigis genui kaj malfermi la buŝon, dum la gardistoj urinis en ĝin. Alia ĉiutaga sperto estis batado per kaŭĉukaj bastonegoj, plumbaj tuboj kaj tuberaĵoj lignobastonoj sur kapon kaj korpon, kelkfoje ĝis la karno fendiĝis ĝis la ostoj. La naci-socialistoj kuracis la viktimojn verŝante botelojn de jodo en la krudajn, nefermitajn vundojn. Kelkajn homojn oni vekis ĉiun dekan minuton nokte, devigis ilin

atente stari, dum gardistoj bruligis lumon en iliajn vizaĝojn, ŝajnigante inspektadon. Fine ili fariĝis nervozaj, fizikaj ruinaĵoj, nepovantaj dormi nokte kaj tage, pelataj al malfacila laboro. Iam la gardistoj, kutime elektitaj el SS pro nekompato, lojeleco al la partio kaj evoluinta sadismo, desegnis lokon sur la planko de la karcero kaj devigis la homojn stari senmove dum du aŭ tri tagoj. Je la fino de tiu tempo la piedoj kaj la kruroj estis tiom ŝvelintaj, ke ili povis nek senti nek iri. Se ili moviĝis de sia loko oni senkompatate batis ilin.

Al la pli multaj el la viroj kaj virinoj oni donis la taskon purigi necesejojn per nudaj manoj, kaj oni diris al ili, kiam ili volis purigi la manojn, ke ili devas leki ilin. Ĉiutage okazis sennombraj aliaj spertoj aŭ tro teruraj aŭ tro naŭzaj por rakonti. Ordinaraĵoj krimuloj ne trapasis tiajn severajn provojn — estis la tiel nomataj politikaj malliberuloj, kiuj devis tion suferi pro venĝo kaj sadista perverso de homoj. Homojn de ĉiuj rasoj, religioj kaj kredoj oni torturis, ĝis ili ne plu estis rekoneblaj kiel homoj estaĵoj. Viroj kaj virinoj estis ĝismorte batataj, pafataj kiam ili provis forkuri, devigataj memmortigi sin, estis viktimoj de tiom sagace elpensita torturo, ke oni apenaŭ povis kredi ĝin vera. Seksaj krimoj de plej malbelega speco estis en la tagordo en la koncentrejoj. La plej malindaj, plej sadistaj

kaj detruaj instinktoj de la homoj estis glorataj tra la mondo, kiu per la veno de Hitler perdis sian rajton esti membro de civilizita raso. Mi supozas, ke nur inter la plej sovaĝaj triboj de plej senluma primitiva vivo kaj en la plej malbonaj jaroj de la inkvizicio sub Torquemado oni povas trovi ion kompareblan al la teroro de Hitler.

Memkompreneble estas terure konstati, ke malamo kaj detruemo estas instinktoj, kiuj kuŝas profunde en la homa naturo — sed amo, idealismo kaj konstruemo estas same profundaj kaj fortaj. Hitler devas en la historio preni la respondecon pro sia atenco malnobligi grandan parton de la homaro kaj pro ĝia degradigo al nur primitiveco kaj barbareco — deklarante noblajn, je teruro por la cetera homaro, la plej furiozajn instinktojn de la homoj.

Silentu, teruraj paĝoj el la nigra libro! Kiu povas nomi ĉiujn teruraĵojn, kiuj okazis sub protekto de leĝoj? Ĉu la homo en sia vanteco ne estas la plej terura el ĉiuj teruraĵoj?

D-ro A. Mildwurf

Por Nia Botanika Ĝardeno

Ni danke kvitancas jene:

62. S-ro Dronchat, Lille, Francujo: semoj de 11-specaj floroj
63. S-ro Arn.van Esch Jr., 's-Hertogenbosch, Nederlando: semoj de 5-specaj floroj

Publika Letero al Franca Ministro pri Nacia Edukado

Franca mondĉivitano, s-ro Johano Pignero sendis al ni la kopiojn de tri publikaj leteroj, kiujn li forsendis respektive al la franca ministro por Nacia Edukado (14/Dec. 57), al la franca ministro por Publika Sano (3/Jan. 58), kaj al la franca ministro por Milito (23/Jan. 58). La unua duono de ĉiu letero tekstas same, sed la lasta duono portas la admonojn aparte verkitajn por la respektiva ministro. Ĉi tie ni volonte publikigas unu el ili, adresitan al la ministro por Nacia Edukado.

S-ro Pignero deziras, ke la legintoj de tiu ĉi letero diskonigu la petleteron ĉirkaŭ si, anstataŭigu lian nomon per la sia kaj sendu tiamaniere sian Publikan Leteron al la Ministro de siaj landoj. La ideon de s-ro Pignero ni forte subtenas, ĉar ŝajnas al ni, ke en la Okcidento kaj Ameriko la danĝeroj de atomaj eksplodoj estas sentataj ĉe la popoloj ne tiom trafibre kaj ĝisoste, kiom ĉe ni japanoj. Ankoraŭ multaj ŝajnas flegmaj kaj eĉ demandas cinike, "Por kio utilis nur tiom multaj petskriboj, deklaroj, ktp.?" Same ankaŭ rilate al la Movado por Mondregistaro. Ni memoru, ke se la Sklavismo en Ameriko kaj aliloke estas forigita, tio estas dank' al la sindona laboro aŭ premado komencita nur de malmultaj celkonsciaj batalantoj kontraŭ la socia maljusteco. Ni sekvu ĉiun bonan ekzemplon ĝis la fina venko!

La Red

Sinjoro Ministro.

Ni legis antaŭnelonge, inter aliaj deklaroj de scienculoj pri danĝeroj kaŭzitaj de atomaj eksplodoj, la tri jenajn deklarojn:

Ie, Deklaro de Profesoro Ralph Lapp, atomista fizikisto usona, datumita je 20a de junio 1956: "Se la nukleaj eksplodoj pludaŭros, la kunamasigo de la danĝeraj radiaĵoj sufiĉos por atingi, *jam en 1962*, la lastan danĝerlimon elporteblan de ĉiu Terano. Jam tuj en 1962, la loto pri termonukleaj eksplodoj estos ja neripareble tiritaj".

2, Deklaro de Profesoro Walter Gerlach (unu el la subskribintoj de l' Manifesto de la 18 germanaj atomistaj scienculoj), direktoro de

la Fizika Instituto en la Munkena Universitato, datumita je la 2a de Aprilo 1957: "Estas tute certe ke, *jam antaŭ 1965*, la radioaktiveco de aero fariĝos danĝera por la homaj estuloj".

3e, Raporto de la Brita medicina Konsilantaro, komence de Marto 1957: La atomaj eksplodoj jam kaŭzis tioman kvanton da radioaktivaj polvoj, ke, eĉ se nenio nova eksperimento okazus, la koncentriĝo de radio-strontiumo atingus krizan nivelon *proksimume en 1970*. Se la eksperimentoj oni daŭrigus laŭ la nuna kadenco, la strontium-koncentriĝo fine atingus la duoblon de la tolerebla dozo".

Tiuj tri deklaroj apogiĝas sur rezonadoj, fizikaj kaj biologiaj,

kies scienca valoro estas nediskutebla, tiom nediskutebla ke la sekreteco, en kiu oni tenas la mezuradojn pri la radioaktiveco de la aero kaj de pluvo povas aperi al ĉiu prudenta homo nur kiel implicita konfirmo de tiu mezurado. Mi do konsideras, ke tiuj-ĉi tri deklaroj valoras.

Laŭ la tria deklaro, kiu estas la malplej pesimista, vi ja povas jam de nun malkonsili al ĉiuj lernantoj dek-unu jaraj ĉiujn superajn studojn, kiujn ili ne povos elfini antaŭ ol eniri en la periodon de sangaj kaj ĝeneralaj perturboj, kiuj neripareble evoluos al antaŭtempa morto.

Jam en 1962, vi povos averti la gepatrojn de la dekunu-jaraj lernantoj, ke iliaj infanoj ne preterpasos bakalaŭron, kaj la gepatrojn de la junaj infanoj enirantaj en la komunumajn lernejojn, ke iliaj infanoj ne transpaŝos la Ateston pri unuagrada elementa lernado.

Jam en 1963-64, vi povos

progresive fermadi la grandajn lernejojn kaj Fakultatojn, ĉar la plej junaj studentoj ne povos atingi Agregaciojn nek Doktorecojn.

Jam de nun, vi povas averti la liceanojn kaj studentojn, ke la instruado, kiun ili ricevas nepre ne utilis al ili.

Laŭ la dua deklaro, la nunaj lernantoj dekunu-jaraj ne povos atingi ĝis bakalaŭro, dum la "novuloj" en komunumaj lernejoj ne transpaŝos ĝis Atesto pri unuagrada lernado.

Laŭ la unua deklaro, jam de hodiaŭa tago vi devus ekfermi ĉiujn lernejojn.

La mono oportune ŝparita el edukado jam de nun absolute vana ebligas al via registaro, ke ĝi pli rapide kaj tute konscie elpreparu la atoman morton de nia Homaro.

Bonvolu akcepti, Sinjoro Ministro, la esprimon de mia plena humileco.

Johano Pignero
Crisenoy S. et M.
Francio

Listo de japanaj urboj nove mondanigitaj

83) Nagasaki-ŝi, urbego en Nagasaki-ken, 18 Jan., 1958; 84) Tokujama-ŝi, urbo en Jamaguĉi-ken, 24 Jan.; 85) Kikai-maĉi, urbeto en Kagoŝima-ken, 28 Jan.; 86) Uŝimado-maĉi, urbeto en Okajama-ken, 30 Jan.; 87) Seto-maĉi, urbeto en Okajama-ken, 28 Feb.; 88) Huse-ŝi, urbo en Osaka-hu, 10 Marto; 89) Hajaŝima-maĉi, urbeto en Okajama-ken, 11 Marto; 90) Jao-ŝi, urbo en Osaka-hu, 17 Marto; 91) Kaŭakami-maĉi, urbeto en Okajama-ken, 26 Marto; 92) Ĉaja-maĉi, urbeto en

Okajama-ken, 28 Marto; 93) Hongomaĉi, urbeto en Hiroŝima-ken, 28 Marto; 94) Macunaga-ŝi, urbo en Hiroŝima-ken, 28 Marto; 95) Tottori-ŝi, urbo en Tottori-ken, 29 Marto; 96) Suita-ŝi, urbo en Osaka-hu, 29 Marto; 97) Aoja-maĉi, urbeto en Tottori-ken, 30 Marto; 98) Jodoe-maĉi, urbeto en Tottori-ken, 30 Marto; 99) Oome-ŝi, urbo en Tokio, 5 Aprilo; 100) Huĉu-ŝi, urbo en Hiroŝima-ken, 21, Aprilo; kaj unu tuta prefektujo: 6) Hukuoka-ken, 10 Marto, 1958.

La Stelo

(Fino)

Mi estas la mondo el sorĉaj fabeloj
Kovrita per pulv' diamanta,
En miaj juveloj rebrilas la steloj
En nigra ĉielo fajrantaj.

Kaj inter ĉi-steloj troviĝas la Stelo
Foraĵojn senlimajn ĵetita,
Al spacoj kaj tempoj flamanta kandelo
Per mano de Di' bruligita.

Kaj tiu ĉi Stelo radia, brilanta...
Naĝanta sur mar' de Eterno,
Jen estas Ci — Tero, Ci — Stelo Plej Sankta,
Ci — Dia de mondoj lanterno!

Al Ci, ho, Stel' mia saluton mi sendas,
Mi cian belegon admiras,
Mi ciajn gefilojn sopire atendas,
Bonvenon al ili deziras!

Nur estas domaĝe, ke morto-inerto,
De mia globeto mort-daŭro,
Delonge min faris malviva dezerto,
En spacoj fluganta kadavro.

Ke nokte min regas frosteg' senkompara
Kaj tage de suno mi ardas,
Ke mian supraĵon planedoj najbaraj
Per rokoj flugantaj bombardas!

Mi estas perdita en spacoj atomo
Droninta en propra senforto,
Sur miaj dezertoj insidas Fantomo,
Sur Tero nomata — La Morto!

Do prave nomate ĉiela paltimo,
Ĉielaperaĵo terura,
Tra l' nigraj abismoj mi kuras senlimon,
Krepuskon senfinan mi kuras!

Mi kuras sub hajlo de feraj flugrokoj,
Venantaj el mondoj misteraj,
Sur voj' de mortintaj, pasintaj epokoj —
Kadavra ŝtonglob' senaera!

*

Sed tie...sur flanko neniam el Tero

Vidata...en plena sufiĉo

Troviĝas necesa por vivo aero

Kaj ĉiuj por vivo kondiĉoj:

En akvo-speguloj de lagoj kaj maroj
Rebril' de la sun' ornuancas,
Zumetas torentoj kaj bruas arbaroj
Dum arbojn ventegoj balancas!

La floroj kaŝitaj en herbo-tapiŝoj

Eligas sanportajn aromojn,

Kaj mankas nek bestoj, nek birdoj, nek fiŝoj

Nek fruktoj...nur mankas la homoj.

Nur mankas la homoj...ho kia teruro,

Ho kiel senlima domaĝo.

Ke mankas la homoj kaj homa kulturo,

Homsperto kaj homa grandsaĝo.

Do sendu, ho Tero, aŭ sendu al mi do

La homojn...mi ege kontentos

Kaj fidu min, fidu...ke cial geidoj

Ĉe mi tuta bone sin sentos.

Kaj volu min kredi, fraterno de l' Suno

(Mi ĵurus, se ĵuri mi povus!)

Ke cial geidoj sur globo de Luno

Edenon perditan retrovos!

Nur sendu...ne timu!...alvenu, teranoj,

Ven' via de vi nur dependas,

Alvenu, herooj de l' Saĝo titana,

Mi vin jam delonge atendas.

Mi ĉiujn alprenos kun granda kontento,

Nur tuj senprokraste alvenu

Kun via kulturo, scienc' kaj inventoj

Kaj miajn riĉaĵojn forprenu!

Alvenu kun via dogmar' religia,

Kun Juno revplena kaj suna

Kun Lingvo Belsona de menso genia

Kreita por uzo komuna.

Saluton, Teranoj! Sukcesan bonvenon

Kun venko, triumfo kaj gloro!

Alvenu, bonvenu!...Mi havas platenon!

Mi havas arĝenton kaj oron!

*

Kaj tiam sur lunaj radioj bluhelaj,

Sur palaj de Luno lum-ondoj,

Ekkuras tra l' nigraj abismoj ĉielaj

Malĝoja de l' Tero respondo!

Respondo de l' Tero — jen stranga afero,

Problemo por solvo tro peza,
 Ĉu tiun respondon elsendas la Tero,
 Ĉu mia animo freneza?
 Jen frapa demando! Jen monstra mistero!
 Jen mia damnda sekreto:
 Ĉu tiun respondon elsendas la Tero,
 Ĉu mi — revemulo-poeto?
 Ĉu mi? Ĉu la Tero? Al propra scivolo,
 Al mia anim' malkvieta,
 Al ĉiuj de Luno fikciaj paroloj
 Mi donas respondon konkretan:
 —Ho, Luno malsaĝa!...ci homojn atendas,
 Pri l' homoj al Tero ci tedas,
 Ŝtonglobe en spacoj ci pendas kaj plendas
 Ke ci la platenon posedas!
 Tre bone! Ĝojige! Por tiu plateno
 La homoj jam baldaŭ alvenos,
 Sed tiun momenton de homoalveno
 Ci iam por ĉiam malbenos!
 Al ci de teranoj kulturo imponas,
 Ci vidas ĝin saĝo kaj bono,
 Ĉar ci la teranojn ankoraŭ ne konas
 Nu, baldaŭ ci ilin ekkonos!
 Memoru: se ci, eble, havas nur ŝtonojn,
 La homoj cin longe ne miras,
 Ĉar tiuj "titanoj", teranoj-friponoj
 Revenos al Tero kaj diros:
 — Sur Luno, amikoj...ho, kia teruro,
 Nur regas malplen' kaj mizero,
 Sur Luno troviĝas nenia sulfuro,
 Nek oro, nek ŝtalo, nek fero!...
 Sur Lun' ne troveblas viv-lok' por hom-gento—
 Parolos kun granda ĉagreno,
 — Sur Luno troviĝas nenia arĝento,
 Troviĝas nenia plateno!
 Sur Lun'!...sed se vere platen' kaj juveloj
 Troviĝas en via posedo,
 Ci tiam ekdamnos al ĉiuj ĉielo,
 Al teroj kaj ĉiuj planedoj!
 Ci damnos, malbenos...apenaŭ cin tenos,
 Ci pala, ĉiela fantomo,
 Grimace mienos, ĉar fine ci venos
 Al ĝusta kompreno pri l' homoj.
 *
 Alvenos la homoj kun multaj diplomoj,

Atestoj pri sia saĝ-klero,
 Sur spacoj de Luno konstruos Ter-Nunon,
 Epokon regantan sur Tero!
 Alvenos, alflugos...lunglobon displugos,
 Elfosos multnombrajn kavernojn,
 Por tiukaverne rampadi alterne
 Profundojn de lunaj internoj.
 En tiuj kavernoj, en luno-internoj
 Ekbolos intensa laboro:
 Homkorpaj tervermoj ĉe lum' de lanternoj
 Fosados platenon kaj oron!
 Kaj apud kavernoj en grandaj kazernoj
 Loĝantaj fosistoj el Rigo,
 Avidaj hom-vermoj el Hago, Palermo...
 Diskutos pri fos-plibonigo.
 Kaj fosos, fosados...per lumo-kaskado
 Trezoroj fositaj ekflamos,
 Per blanka plateno, sang-ruĝa rubeno
 Lunanoj Lunglobon ornamos!
 Ho kiom da oro, ho kiom da ŝtalo!...
 El centraj or-bazoj, el lokaj...
 Al Ter' malproksima ekflugos signaloj,
 Minacaj signaloj provokaj:
 —Sur Luno — alarmo! Sur Luno — malpacoj!
 Sur Luno — pugnitaĵoj la manoj!
 Tuj sendu sur Lunon — ekfulmos en spacoj —
 Cent bomboj kaj mil policanojn!
 Sur Luno regadas agordoj militaj!
 Sur Luno — kompleta ord-manko!
 Tuj sendu sur Lunon soldatojn armitajn
 Je bomboj, pistoloj kaj tankoj!
 Sur vasta Lunglobo fariĝis malvaste,
 Ekregis kverel', maltrankviloj...
 Alarmo!!!...alsendu, sed tuj senprokraste
 Juĝiston kaj tri pendigilojn!
 Bonvolu respondi tre gravan demandon,
 Sed klare, sen ia kompliko,
 Ĉu Lunon (kun oro!) proprigas Ruslando,
 Anglujo, ĉu Nord-Ameriko?
 Ĉar angloj kun rusoj, hispanoj kun danoj
 Germanojn kondamnas, malbenas...
 Kaj provas finpruvi per vortoj kaj manoj
 Al kiu Lunglob' apartenas!
 —Lunglob' estas nia! — pruvadas japanoj
 Dum longaj diskutoj kribruaj,

— Ne...nia! — rekriras sovjetunianoj —
 Ni venis sur Lunon unuaj!
 Sed kiu konstruis dum lastaj du jaroj
 Unuan artlunon, mefistoj?!
 Ja ni!...-krias angloj — Por niaj dolaroj!...-
 Rekrias nov-jorkaj fosistoj.
 — Ne gravas! — trakkrii kriantojn kripenas
 La turkoj kun sent' de malamo
 — La Luno (kun oro!) al ni apartenas,
 Lun' estas simbol' de Islamo!
 — Malsaĝ', superstiĉoj... moskeoj, simboloj...
 Ĝi estus plej granda maljusto,
 Lun' nia, ĉar Luno istigas nin, polojn
 Al ĝua pekam' sub arbustoj!
 Sed poloj malpravas, ĉar samajn bonŝancojn
 De lum-influado je amo
 Samhavas italoj, norvegoj kaj francoj,
 Leproj kaj hipopotamoj!
 Tuj sendi soldatojn! Sur Luno — batalo!
 Lunanoj danĝere ribelas
 Kaj oron, platenon, sulfuron kaj ŝtalon
 Popece forrabas, disŝtelas!...
 Soldatojn, soldatojn!...-fulmados obstine
 En spac' de signaloj plenplena —
 Ĉar oni ne scias, al kiu finfine
 Lunglobo (kun or'!) apartenas!
 Soldatojn!...Ĉar vere ni havas jam tro... pro
 Senĉesa sur Luno hororo!
 Kaj kiu posedas la rajton de propro
 Rilate la Lunon kaj...oron?!
 Alsendu recepton por supoj legomaj
 Kaj voston por hundo senvosta,
 Kaj senda neceso du bombojn atomajn,
 (Ve!... bomb' hidrogena tro kostas!)

Alsendu kakaon kaj freŝajn tomatojn,
 Alsendu multkvante, ne ŝparu...
 Kaj nepre alsendu armitajn soldatojn,
 Kaj ili Lunordon refaru!

*

El "Stelo Mirakla" en granda amaso
 Alvenos armitaj friponoj,
 Alvenos kun bomboj, pistoloj kaj gasoj,
 Kun tankoj kaj multaj kanonoj.
 Alvenos proletoj, dukloroj kaj grafoj
 Avidaj je ĉiaj glor-laŭroj,
 Sur lunaj dezertoj ekkrakos ekpafoj,
 Ekfalos unuaj kadavroj.

Kaj flugos el Luno ĉielen al steloj
 Sovaĝaj ekkrioj militaj,
 Kaj falos en rubojn hoteloj, bordeloj...
 De homoj sur Lun' konstruitaj.
 El Ter' malproksima al pala lunglobo,
 Ĵetitaj per man' de Hom-Besto,
 Kunflugos en bomboj mortigaj mikroboj
 De ftizo, ĥolero kaj pesto.
 Kaj mortos Lunanoj samkiel la kuloj
 En fumoj de gaso venena,
 Kun muta demando en mortaj okuloj:
 Al kiu Lun-or' apartenas?
 Kaj kovros la Lunon kadavroj kaj tomboj
 De homoj "mortintaj en gloro",
 Mortintaj de kugloj, mikroboj kaj bomboj
 Samkiel sur Tero — p r o o r o ! !

*

La oro! La oro!...ĝis kiam ekzistos
 La oro kaj oro-kvalitoj,
 Ĝis tiam la homoj per bomboj sin pistos,
 Ĝis tiam eksplodos militoj!
 Ĝis kiam ekzistos la oro-valor
 Ĝefkaŭzo de krimo-simptomoj —
 Je nomo de oro, pro oro, por oro
 La homoj mortigos la homojn!!
 Ĉar kvankam homcerbo, laŭ saĝa proverbo,
 Egale: araba aŭ hinda,
 Per saĝo radias, miraklas, genias...
 Kor' tamen plu restas damninda!
 Pro oro!!!...

*

...kaj iam, sur iu planedo
 Cerbuloj lornetojn eltiros,
 Sur ia Saturno, Joviŝ', Andromedo...
 Ĉielobservantoj ekmiros.
 Ekmiros kaj diros:— Jen fakto konkreta,
 Bonvolu nun ĝin konsideri:
 Ĉe tiu stel' granda lumetis stel' eta
 Kaj tiu stelet' malaperis.
 Sed kial? Enigmo...ni devas esplori...
 Eklipso aŭ ia lum-paŭzo,
 Aŭ io alia...ni devas memori:
 Nenio pereas sen kaŭzo!!

*

Efik' de esploro:— Laŭ ĉiuj eblecoj,
 Laŭ aŭtoritato certplena,
 Steleton arĝentan frakasis en pecojn
 Eksplodo de bomb' hidrogena.

LA DRONINTO

— Sebastião Nery

“Todo en Ti fué naufragio” (Pablo Neruda)

*Kiam vi aŭdos ian bruon de maro
flustrantan misterojn
al la nuda rozujo
demetu la sandalojn
kaj venu paŝi en la strando.*

*Kiam vi vidos iun ondrompon
banantan seke
la pasejon nian
eltiru la gantojn
kaj venu rikolti ŝaŭmojn sur la roko.*

*Kiam vi sentos fiŝodoron
invadantan sale
la ĝardenon de l' iamo
purigu la palpebrojn
kaj venu rigardi la barkojn en la kajo.*

*Kiam pasos la julia frosto
vundantan prujnojn
en via korpo mia
liberigu la harojn
kaj venu akcepti la venteton en la pavezo.*

*Kiam oni diros al vi, ke estas lumkaresoj
banante lunlume
la forgesitan ŝoseon
forlasu la klavaron
kaj venu vidi la kokosujojn ami la stelojn.*

*Kaj kiam mia korpo de skvamoj kaj algoj
vestita per jarcentoj
reviviĝinta en tajdoj
elakviĝos sen mi*

ŝmiru viajn lipojn

*kaj kisu la droninton, kiun vi kondamnis remaĉi salajn eternecojn
en la strando de via strato.*

SISMOGRAFO

— Bueno de Rivera

*Kial ne esti kiel la aliaj, serena kaj klarvida
antaŭ enterigo aŭ balo?
Havi programon, la mekanikan ekzistadon
en ĉiam egalaj tagoj, la ĝustan horon
por la kondolencoj, la tagmanĝo, la sporto kaj la kiso.
Taglibro, kie antaŭdiktinte al mi
mi sciis, kiel en sociregistro
naskiĝon kaj morton anticipe.
Kial ne esti kiel la aliaj, anekdota,
frivola, sensenta, praktika?
Posedi la miraklon de forgeso, kvazaŭ la kurteno
descendus super la tragedion kaj estus aplaŭdoj...
Legi la ĵurnalojn sen emociiĝo, deteni la okulojn,
kvazaŭ muŝoj, sur la ulcerojn kaj, je simpla gesto,
flugi, serĉi la vizaĝon, la fromaĝon, la rozon...*

*Sed ne. La skuo de l' mondo registras en min
la proteston, la galan vorton, la amaran
kolektivan stertoron. En mi daŭras
la kruelaj bildoj, kiuj sangas kaj stampiĝas
en mian vizaĝon, en mian kanton.
Ili estas la fajraj nuboj super la lago, stratoj
en totala incendio,
la fulmo en la arboj, la spronoj
en la karno, sango sur la reloj, morto
en la anguloj de l' nokto.*

*Iu ajn okazaĵo, intensa aŭ fuma,
proksima aŭ fora, min regas,
kaptas miajn nervojn. Mi estas fosto
krucigita per dratoj en la montara soleco.*

Ricevilo de agonioj, aĉa ciferplato

de pikaj figuroj, kruda spegulo,
rozo de furiozaj ventoj, luno
de neglektitaj flakoj.

Eskima infano
falas en glaciejon.
Mi iĝas pala kaj frosta...

Esploristo en Afriko
Formanĝas sklavon. La malamo
min transportas al Sudano.

Mi estas lukto en Siberio
kaj mia plendo perdiĝas
en la arktika mistero.

Mi akompanas la negron
de Ameriko kaj suferas,
la vizaĝo karbonigita
en la elektra torturo.

Infano mortas
en iu strato de Ŝanhajo.
Ĉeestante mi priploras
la agonion de l' lilio.

Mi estas Acre kaj Senegalia,
karcero kaj soifo,
torĉo en la kamparo,
petrolo en viaj strandoj.
Sismografo-homo
en la puto, en la mondo.

El "LUMO DE L' MARÇO"

MORTINTOJ EN REDINGOTO

— Carlos Drummond de Andrade

Ekzistis en angulo de la salono, albumo de netolereblaj fotografiaĵoj,
Plurmetrojn alta kaj malnova de infinitaj minutoj,
Sur kiu, ĉiuj kliniĝis

pro la ĝojo primoki la mortintojn en redingoto.

Vermo ekrodis la indiferentajn redingotojn
kaj rodas la paĝojn, la dediĉojn kaj eĉ la polvon de la portretoj.

Nur ĝi ne rodas la neestingeban singulton de vivo ŝprucanta,
ŝprucanta el tiuj paĝoj.

POEMO

— Dirceu Quintanilha

Ĉi tiu estas mia imperio
— Miaj libroj, miaj cigaredoj,
La trista pejzaĝo vidata
El fenestro.

Ja enfiltriĝis en min,
Por ĉiam
La laceco el ĉiuj
Entuziasmoj konsumitaj.

Alparolu min, vi diferencaj homoj,
Pri la vertiĝo de la kisoj
Kaj renovigitaj amoj.

Iluzio... kantas en mi
La flagrantan animon
De lumantaj kandeloj.

Kaj la vivo de la raportitaj amoj
Estas cindro,
Ĉar en la ĉiela vasteco
Ekzistas la densa ministerio de l' infinito.

Kaj kie viaj instinktoj eltrovas
La estantan momenton
Mi kaptas la animon de l' tempo
Kaj frakasas en la manoj
La neniaĵon de ĉiuj deziroj...

El Japanaj Modernaj Poemoj (6)

ABE Tamotu (1910 —)

La Maro de Isikari

For for...
Senfine daŭrantaj dunoj —
Senĉese sin movetanta
ora karno.
Malluma remparo.
Lumtura lum' en foro —
Ĉi tie literoj neniam skribitaj,
ĉi tie bildo neniam pentrita,
ĉi tie spaco neniam prikantita —
Trans tiuj dunoj
jen River' Isikari.
Trans la dunoj
senĉese kantas la norda maro;
sur la sablaĵo floras bordrozetoj...

ANZAI Huyue (1898 —)

1. Printempo

Sola papilio forflugis super la Tatara Malkolo.

2. Pasero

Ĝi portas la konstantan kostumon de l' ĉielo nebulanta.

3. Domegoza Pejzaĝo kaj Civilizo

La domo de l' fotografisto, kiu la unua enkondukis tien
civilizon, nun ŝimaspektas en la pejzaĝo.

4. Naskotago ree

Mi fiksas per pinglo papilion sur la muron. Ĝi sin ne plu
movas. Tiel same kun la feliĉo.

Sur la manĝotablo dombesto fiksas per rubando sian
bestoformon,
en la botelo akvo en la formon de l' botelo,
kaj ŝi sian belecon en sian ĉemizon,

1—4: El "Militŝipo Mali", 1925

AOYAGI Mizuho (1899 —)

1. Povreco

Mi fiksas mian monujon sur la muron per pinglo.
Ĝi estas tiel solena, kiel Kristo ĉe la morto.
Mi varmigas min per bruligo de miaj pipoj.

2. Povreco (refoje)

Meze de severa vintro
intense inflamiĝas mia povreco.
Ho, vi orfiŝo glaciigita!
Por krevigi ĉi glacieron de sentkapablo,
mi sopiregas nur je unu pinglo.

3. Virino

Ŝiaj piedoj kaj manoj fluas, kiel akvo.
Ondoj metas sin sur la korpo kiel korpoj.

HAGIWARA Sakutaro (1888-1941)

Murdo de rano

Rano estas murdita —
Infanoj en rondo levis la manojn.
Ili ĉiuj
kune levis la manojn,
amindajn sangoŝmirajn —
La lun' aperis.
Staras hom' sur la monteto:
vizaĝo sub la ĉapelo.

HISIIYAMA Ryôzô

1. Vesperaj birdoj

Ili kantadas la vesperon. Ili havas neston por enloĝiĝi sur
arboj — Ilia kanto trapikas miajn versojn, kiel kugloj.

2. Informoj

Cikado kantas en la ĝardeno surtegmenta. Kie? Ĉu sur
arbopintoj? Sed nenie arboj; Mi ne vidas arbopintojn. Plena
estas nur la klara ĉielo.

Cikado kantas en la ĝardeno surtegmenta.

Tradukis K. Matuba

Poemo de l' Tomboj

de Ugo Foscolo

*

Al memorinda Moŝto *Markizo Generalo Carlo Cordero Di Monzemolo* al kiu la revo de unu homa familio per Esperanto ne ŝajnis utopio, kun sindona animo dediĉas La Tradukinto: Prof. *Corrado Cerri*, Italio.

I

En ombro de cipresoj kaj en urnoj
konsolate de plor' ĉu estas dormo
de l' morto malpli dura? Kiam suno
por mi la teron ne fruktigos iom
por tiaj arbitraj familioj kaj bestaj,
kaj kiam graciaj pro esperoj antaŭe
al mi ne dancos plu estontaj horoj,
nek de ci, amiko, mi aŭdes version
kaj splenan harmonion kiu ĝin regas,
nek en mia koro animo iam parolos
pri virgaj muzoj kaj pri amo pura,
sola spirit' por mia vaga vivo,
kiom konsolos ŝtono irintajn tagojn
kiu distingos miajn el sennombraj
ostoj, kiujn maren, teren semas morto?
Vere estas, Pindemonte, eĉ l' espero,
lasta Diino, lasas tombojn; ĉion
volvas forges' en sia griza nokto;
kaj ilin laborema fort' lacigas
pro rea movo; homon, liajn tombojn
kaj mienojn lastajn kaj la restaĵojn
de l' tero aŭ ĉiel', la tempo ŝanĝas.

Sed kial tiel frue iluzion mortulo
al si envios, kiu mortinta igas
lin halti antaŭ la de Dito limo?
Ĉu li ne vivas eĉ entere kiam
por li mutiĝos harmoni' de l' tago,
se ĝi vekigigas per dolĉetaj zorgoj
en memoro de l' siaj? Ĉielula estas
ĉi tia intersanĝo de pro amo pensoj,
dia eblo estas en la homoj, kaj
per ĝi oni vivas kun amiko estinta
kaj mortinto kun ni, se pia la tero

kiu infanaĝan akceptis lin kaj nutris
en sia patrino sino, ejon lastan
donante, sanktaj igos la restaĵojn
el insultado de homaĉaj piedoj
krome pluvegoj; ununoma ŝtono,
kaj de amika plantejo odoraj floroj,
cindrojn per ombroj iliajn iom konsolu.


Nur kiu ne lasas amajn heredaĵojn
nur etan ĝojon havas en urno; garde
jam post sia morto vidas la animon
inter bedaŭroj de Aĥeronaj temploj,
aŭ sub la alojn grandajn ĝi rifuĝas
de dia pardono, sed sian polvon
lasas al urtikoj de dezerta tero,
kie nek virino enamiĝinta preĝu
aŭ ekĝemon aŭdu vojaĝanto,
kiun el la tero al ni donas Naturo.

Ja nova leĝo trudas nun tombejojn
ekster pi-gardoj; al mortuloj nomon
ĝi malpermesas. Dormas sentombe
pastro cia, Talia, kiu laŭron
en malriĉa loĝejo kantdediĉis
kun granda amo kaj da kronoj pendis;
danke ci kantojn per rideto ornamis
kiuj lombardian luksulon piketadis,
al kiu estas dolĉaj la blekad' de bovoj
kiuj el la Addaj kavoj kaj Tiĉinaj
per manĝoj feliĉigas kaj per distroj.
Ho bela Muzo, kie ci estas? Sentas
mi ne ambrozian spiron, de ĉeesto avizo,
inter ĉi plantoj kie mi sopiras
patrinan domon. Kaj ci venadis
kaj al li elrifis sub tilio kies
nun foliojn tristajn ci tremigas
ĉar ĝi ne kovras de oldulo urnon
al kiu ne ŝparis ombrojn ci, trankvilon.
Ĉu inter tomboj de plebuloj gardas
ci irvagante, kie la kapo dormas
de cia Parini? Al li ombrojn donis
ne en siaj muroj urbo voluptema
pri kastritaj kantistoj tre loganta,
nek ŝtonon, nek vorton; eble ostojn
tranĉita kapo de ŝtelist' sangigas,

lasinta krimojn sur la eŝafodo.
 Ĉu sentas raspi ĉi inter rubaĵoj
 hundinon forlasitan kiu vagantas
 transen la tombojn bojaĉant' nesate;
 kaj eliri kranion kien fuĝis lunon
 upupo, kaj flugante al krucojn
 dise ĵetitaj trans funebran kampon
 la malpura riproĉi per singulto
 tristaradiojn per kiuj steloj pias,
 forgesitajn tombejojn. Ĉi Diino
 vane preĝas rozarojn sur poeto
 el la malvarma nokto! Ve, al mortintoj
 ne naskas floro, se la homaj laŭdoj
 ne honoras ĝin per amega ploro.

II

De kiam edziĝoj, tribunalo, altaroj
 estigis homajn bestojn kompatemaj
 pri si kaj aliaj, la vivuloj prenis
 el l' aero malbona kaj el bestoj,
 la mizerajn restaĵojn kiujn Naturo
 per celoj eternaj por alisentoj igas.
 Atestoj de la gloroj estis la tomboj,
 altaroj al filoj; la respondoj elvenis
 el hejmaj laroj; oni ĵuron timis
 sur la polvo de l' avoj:
 religion kiu per diversaj ritoj
 patrujaj virtoj kaj familia pieco
 transigis longan aron da jaroj.
 Ne ĉiam por temploj la de tomboj ŝtonoj
 estis planko; nek per la incenso



La floroj de amerika
 kornuso (Cornus florida L.)
 antaŭ la domo de s-ino
 Naohi Deguĉi en Kameoka.
 Legendo diras: Kiam Jesuo
 krucumiĝis, la floroj de
 kornuso tiom lamentis, ke
 la pintoj de kvar petaloj
 estis markitaj per larmoj
 formantaj la krucsignon.

kadavra malodoro la piemulojn
 malpurigis; nek urboj iĝis tristaj
 pro desegnaj skeletoj; la patrinoj
 terure saltas dum la dormo, etendas
 la nudajn brakojn sur la amatan kapon
 de suĉinfano, por ke ĝin ne veku
 longa ĝemado de mortinta homo
 kiu petas preĝon de la heredantoj
 el la Sanktejo. Sed cipresoj, cedroj
 per puraj eliĝoj, zefirojn igas plenaj,
 daŭran verdon etendis sur la urnojn
 por senfina memoro, kaj valoraj
 potoj akceptis konsekrigajn larmojn.
 Ŝtelis la amikoj sunfajreron etan
 por igi luma la subteran nokton,
 tial ke mortante sunon serĉas homaj
 okuloj; kaj ĉiuj etan spiron lastan
 brustoj dediĉas al iranta lumo.
 Akvojn purigajn enverŝante, fontanoj
 amarantojn kreskadas kaj violojn
 sur funebra bulo; tiu kiu sidis
 lakton oferverŝi, penojn rakontante
 al karestintoj, bonodoron sentis
 ĉie kiel aero de Edenoj benaj.
 Pia Frenezeco kiu amadi igas
 al britvirinoj la tombejĝardenojn
 ĉe la posturbo, kien viva amo
 gvidas ilin por morta paĉjo; kie
 Geniojn preĝis por reven' de heroo
 kies triumfanta ŝipo estis tranĉita
 el granda pinto kiu fariĝis ĉerko.
 Tamen, dormante varma agaddeziro,
 kaj se reguloj estas de l' vivo
 riĉec' kaj timo, malutila pompo
 kaj malbonŝancaj imagoj de la Ogro
 estas kolonoj kaj marmoraj aĵoj.
 Jam klerulo, riĉulo, patriciano,
 honor' kaj menso de la itala lando,
 en flataj ejoj reĝaj havas tombojn
 dumvive, kaj blasonojn nuraj laŭdoj.
 Al ni morto pretigu ian gastejon
 ripozigan, kie sorto venĝojn ĉesu
 kaj rikoltu amikeco ne trezorojn
 heredajn, sed korajn varmajn sentojn
 kaj, pri liberala versaĵo, ekzempleron.

(Daŭrigota)



★ GRAND DICTIONNAIRE ESPERANTO-FRANÇAIS de Gaston Waringhien, eldonita de Librairie Centrale Espérantiste, 41, Rue Descartes, Paris (Ve). Tole bindita kaj vestita en plastika kovrilo travidebla; 368 paĝoj (14 × 19.5 cm); Prezo 2,200 fr. fr. plus 10 % por send-kostoj.

La Dictionnaire Complet Espéranto-Français de E. Grosjean-Maupin estas jam delonge elĉerpita, same kiel la Enciklopedia Vortareto de Ch. Verax. De post 1910, kiam la du cititaj vortaroj aperis, "Esperanto konsiderinde disvolviĝis kaj kreskis: la sciado de la zamenhofa lingvo perfektigis, ... la literaturo riĉiĝis je multaj verkoj, ..." Tiel skizante en la Antaŭparolo, Waringhien daŭrigas pri la celoj de sia vortaro:

"Tial mi prenis sur min la taskon doni al la francaj esperantistoj vere modernan vortaron, per kiu ili povu sekvi la literaturan esperantan movadon kaj ne esti haltigitaj pro la tro striktaj limoj de intence reduktita leksikono. Oni tro ofte forgesas, ke tia vortaro devas servi antaŭ ĉio por kompreni la ekzistantajn tekstojn, kaj ke ĝia aŭtoro ne devas timi ampleksi la tutan riĉecon — kiun iuj opinioj superflua aŭ malfekunda — de la literatura

lingvo, riĉecon, pri kiu li ne respondas, certe, sed el kiu liaj samlingvanoj rajtas profiti; kaj li estus kulpa, se tion li ne ebligus al ili...

"Ankaŭ al la nefrancaj esperantistoj mi intencis servi; al ili jena verko povos utili dumaniere: ĝi ebligas al ili trovi, per ilia franca-nacilingva vortaro, la ĝustan tradukon de vortoj teknikaj, kies esperanta difino povus al ili ŝajni duba aŭ nepreciza: tiel ke ĝi povus aspekti kiel aldono al la *Plena Vortaro*; aliflanke, ili kapablos senpere kontroli sian scion pri la franca lingvo, aŭ ĝin riĉigi paralele kun sia praktikado de la internacia lingvo: tiucele mi markis per steleto la vortojn familiarajn aŭ vulgarajn, kiuj pli kaj pli enpenetris en la konversacian lingvon, sed kiujn oni ne povus uzi sendistinge en ĉiu loko aŭ medio."

Ekzameni la enhavon de tia ampleksa vortaro estas tasko neplenumebla en mallonga tempo. Mi tamen atente transrigardis la enhavon kaj faris kelkajn notojn, kiuj donos al niaj legantoj almenaŭ la konturojn de tiu ĉi vortaro.

1. Novaj vortoj (ekz-e: *ekologo*, *faŭli*, *intrinseka*); taŭgaj frazoj kaj kunmetaĵoj estas enkondukitaj kiel ekz-e: *mensa postresteco* arriération mentale; *plenumi la irkomisiojn* faire les commissions; *doni cedon al iu* donner un avantage à qn (jeu), *kontroli per la naŭ* faire la preuve par 9; *ekstraj folioj* main de passe (typ.); *ariĝemeco* sentiment grégaire; *kaŝpolico* police secrète; *retrofrapo* coup de bélier (psh.); *prifriponi* jouer (qn), *duper*, *refaire* (qn au jeu); *praantaŭlasta* antépénultième; *glitvelero* verglas; *farbo-krajono* crayon de couleur; *skribsubaĵo* sous-main; *birdosemaĵo* grains pour les oiseaux; *vicfrato* enfant d'un premier lit d'un des conjoints par rapport à l'enfant d'un premier lit de l'autre conjoint; ktp.

La kunmetitaj vortoj (por kiuj la

aŭtoro dankas, i. a., al la "Kunmetitaj Vortoj el Zamenhofaj Verkoj" de Naokazu Kawasaki) estas zorge elektitaj, kune kun la novaj formoj taŭgaj por la aktuala aŭ pli-malpli teknika uzadoj; sed la kunmetaĵoj el la moderna komuna literaturo ŝajnas ne tiom sufiĉaj kiom da novaj vortoj.

2. La signifo de multaj vortoj el la *Fundamento* estas ampleksigita aŭ per ĝisdata aktualigo aŭ per ekzakta detaligo, kiel

PARKO: parc (enclos), réserve (de chasse) / parc (jardin) / parc (autos); ~i parquer (auto); ~ado stationnement

VEKTO: palanche (de porteur d'eau) / fléau (de balance) / culasse (d'électro-aimant).

La signifo de pluraj vortoj tamen restas primitiva. Ekz-e: Pikedo.

3. Por tiuj ekzemploj de frazfarado, kiaj mankas en tiu ĉi vortaro, oni povas sin turni al la respondaj vortoj en la Plena Vortaro.

4. Multaj teknikaj, botanikaj kaj zoologiaj terminoj estas enkondukitaj. Waringhien "klopodis kolekti la bildofarajn nomojn de plantoj kaj bestoj", kaj sugestas la formon *neforĝesumino* por *miozoto*. Sed ne ĉiam, ĉar *akileo* ne kondukas al *milfolio*, nek *palumbo* al *arbokolombo*.

5. Personaj kaj geografiaj nomoj estas troveblaj inter la komunaj vortoj. El la urbonomoj de *Nipono* (vorto adoptita) mi trovis nur kvar: Tokio, Jokohamo, Hiroŝimo, Nagasako.

6. Pri la vortoj, kiuj havas pli ol unu formojn, aŭ du apartajn formojn, la prefero de Waringhien estas konsultebla. Li preferas, ekz-e, *Buddo* al *Budho* kaj *Budao*; *ekskluzivi* al *ekskludi*; *atendi* al *ekspekti*; *bazopilko* anst. "basbalo," kiu mankas; *ekzotika* anst. "ekzota," kiu

mankas.

7. Kelkaj vortoj akompanas francajn vortojn vulgarajn aŭ familiarajn el la konversacia lingvo, kaj ĉi tiuj estas markitaj per steleto por montri, ke ilin "oni ne povas uzi sendistinge en ĉiu loko aŭ medio". Ekz-e: *dikulino* une grosse dondon; *ordinarulo* un type quelconque.

Laŭ la aŭtoro, la 7 estas intencita por servi ankaŭ al la nefrancaj esperantistoj tiel, ke ili kapablos riĉigi sian francan lingvo-scion "paralele kun sia praktikado de la internacia lingvo." Sed ni povus konsideri ke ĝi estas provo riĉigi nian parol-lingvon — provo nova en Esperanta vortaro kaj bonvena, ĉar ŝajnas ke la aplikado de tiaj sencoj plejparte estas nur ioma plivastigo aŭ precizigo de la potenciala signifo de la ekzistantaj vortoj. Ni vidu ankoraŭ kelkajn ekz-ojn (kies ordinarajn vortojn en la franca mi ellasos ĉi tie). *Tedi* raser; *aplombo* culot; *ŝvitegi* être en nage; *subridi* rire dans sa barbe; *malnaiva* dessalé... sed notante plurajn tiajn vortojn mi rimarkis ke pli oftaj estas la trivialaj esprimoj, kiaj ial "odoras" vinon kaj virinojn: *brandejo* bistro; *drinkulo* un poivrot, *pochard*; *postebrio* gueule de bois, mal aux cheveux; *fuŝmiksi* baptiser; *dandino* poupée; *fivirino* une roulure; *viringo* catin. Dum abundas ankoraŭ aliaj esprimoj por "virinaĉoj," estas mirinde ke mankas tiaj Esperantaj vortoj, kiuj esprimas la tipojn el "belulinoj" kiel sveltulino, ŝikulino, ravulino, fascinulino, ĉarmulino, amindulino (ĉu pro manko de tiaj vortoj en la Esperanta literaturo?). Fraz-ekzemploj: *ne ekscitiĝu!* ne vous frappez pas!; *taŭzi la harojn al iu* (f) crêper le chignon; ktp.

La 7 ne estus ĉefafero de tiu ĉi vortaro, sed se jam la provo estas farita, mi sugestias ke la kompilinto estus povinta kolekti pli abundan materialon el la jam

ekzistanta vasta literaturo. Tiaj fontoverkoj ne mankas. Sed la tiel kolektota materialo farus apartan dikan vortaron!

En la 6, supre, mi notis, ke la aŭtoro prefero je kelkaj vorto-formoj estas konsultebla. *Glitveturilo* kondukas (=) al *sledo*. Tiel: *pafilkapo* = *kolbo*, *faldumi* = *plisi*, ktp., sed la duaj ne redirektas sin al la unuaj por montri (per ia signo) ke ili estas sinonimoj. Cetere, egalsignoj tute mankas inter *laktofrato* kaj *mamfrato*, *veterinaro* kaj *bestokuracisto*, ktp. Tio ĉi estus bedaŭrinda por tiuj, kiuj serĉos la sinonimojn dum verkado aŭ tradukado, des pli ke la kompilinto intencis helpi ilin tiucele donante plurajn Rimarkojn.

Troviĝas kelkaj nekompreneblaj. Kion signifas: *agi* sin = okazi; *akiri* (trovi) akirlaboron; *kisinda* (désirable), ktp.?

La vortodivido estas foje konfuza: kantik/o, poet/iko, stilistik/o, beletristik/o, ktp.

Miaj kritiketoj neniel malhepas min aserti, ke tiu ĉi vortaro estas la plej kompleta kaj fida el ĉiuj Esperantonacilingvaj vortaroj, kiuj iam aperis, kaj ke ĝia utilo estos granda ne nur por francoj, sed ankaŭ por la nefrancoj, kiuj peruzos vortaron franca-nacilingvan eĉ nur por "laŭvorta" konsultiĝo pri nekompreneblaj francaj vortoj.

La bindaĵo estas treege "ŝika."

Teruo Mikami

★ AMARA PANO de József Darvas; el la hungara tradukis Ladislao Somlai. Eldonita de Dana Laborista Esperanto-Asocio, p. a. M. Jacobsen, Rydersvej 9, Aarhus, Danlando; 112 paĝoj kun kartona kovrilo; Prezo d.kr. 7—1 dolaro.

La skizo de la rakonto estas ĉi-suba: Aleksandro, la ĉefpersono de ĉi

rakonto, estas unu el la junaj farm-servistoj, dungigita en la tago de Epifanio kaj servute plenumas senripozan penigan laboron ĝis Silvestro (kiam li liberigis). La mastro vipe draŝas al li la kapon kaj dorson, kiam ajn okazas io, kio ne estas laŭ lia gusto kaj ordono. Dume Aleksandro la junulo sentas senesperan amon al la bela edzino de la mastro, sed unu nokton lin logas malbela servistino al kunkuŝo kaj li estas devigata edziĝi al ŝi. Aleksandro ne estas malserioza junulo. Li profunde cerbumas pri la vivo — pri ĉio, kio okazas ĉirkaŭ li — dume la dubo pelas lin al meditado: Por kio valorus la libero, se mankus pano? Ĉu eblas ŝanĝi la mondon? Tia primitiva sento de indigno kontraŭ maljustaĵoj kondukas lin al religio, kiu tamen lasas lin trompita.

En la Silvestro li fariĝas libera, sed devas perlabori la vivon; li havas edzinon kaj infanon. En la Epifania tago li denove dungigita ĉe mastro kaj la vivo estos same mizera dum la tuta tempo de Epifanio ĝis Silvestro.

En tiu ĉi novelo, la aŭtoro priskribas malkaŝe, realiste kaj objekte pri la senespere mizera ĉiutaga vivo de farm-servistoj en Hungario en la tagoj tuj antaŭ la dua mondmilito.

Eĉ pri kortuŝe mizeregaj realaĵoj li skribas sufiĉe flegme, kvankam oni povas supozi ke li mem travivis ion similan; aliflanke li neniam montras sin komuniste tendenca, kio, al mi ŝajnas, kontraŭe efikas ke la legantoj mem entiriĝu en la profundan pensadon pri la problemoj de malriĉeco, kiu kiel kronika malsano regas en la socio.

Kvankam mi ne havas rimedon certigi, ĉu ĉi tiu rakonto apartenas al la ĝenro de tiel-nomata socialisma realismo aŭ ne, almenaŭ mi povas diri, ke la fida desegnado per realista plumo donas freŝan kaj fortan impreson. Efektive la homa

vivo estas ĉesence nur la sinsekvo de enuigaj bagatelaĵoj ĉiutagaj, sed en ĉi tiu novelo prezentiĝas ja la sinsekvo de tro amaraj tagoj sen pano, sen ripozo, sen amuziĝo, sen espero, kaj ekzistas nur senĉesa ripetado de indigno, ĉagreno, plendo kaj malĝojoj, kiuj ripetigas de generacio al generacio.

En la lasta paĝo la aŭtoro ĝemspire finas la rakonton kun la vortoj per la buŝo de instruisto.

— Ankaŭ Kristo ekiris el la stalo por ŝanĝi la mondon. Ankaŭ li ne sukcesis.

Masajuki Kuroda

★ DUA OFICIALA BULTENO DE LA 43-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO EN MAINZ. Formato: A4 (14.5 × 20 cm); 28 paĝoj plus 4 kovrilpaĝoj kun ĝeneralaj informoj, Regularoj de la Belarta Konkurso, Oratora Konkurso, kaj provizora programo de la U. K. en sep ĉapitroj (manifestacioj antaŭ la Kongreso, kongresaj laboroj, kulturaj programoj, 3-a Internacia Infana Kongreseto, 28-a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj, festoj).

La Dua Bulteno entenas ankaŭ provizoran programon de la Antaŭkongreso en Homburg kaj de la Seminario de s-ro Cseh, plenan ekskursan programon (kun plano) kaj ĉiujn loĝigajn informojn. Pluraj anoncoj kaj la bildoj de la membroj de L. K. K. ilustras ĝin. Senpage ricevebla nur al kongresanoj.

★ MAINZ, 8-paĝa faldfolio kun koloraj ilustraĵoj, havebla ĉe Städtischen Presseamt Mainz, Germanujo.

★ KRISTANA KULTURLABORO EN NIA TEMPO, prelego de Erik Hj. Linder farita ĉe Tutŝtata Kunveno de la Svedaj Liberaj Eklezioj, tradukita kaj eldonita de Esperanto-Missionen, Klackavägen,

Nora Stad, Svedujo, kiel la oka kajero de Evangelia serio; 29 paĝoj en formato: 12.5 × 18.5 cm; prezo: 1 sv.kr. aŭ 2 resp. kup.

★ EIFELTURO, instrua materialo de ornam-desegnado por junaj gelernejoj; eldonita de Zamenhof-Fondo, Poŝtkesto 804, Jerusalem, Israel; 26 paĝoj plus 2 kovrilpaĝoj kun la titolo "Eifelturo" skribita en 28 naciaj lingvoj; formato: 16 × 21 cm; prezo: 2 resp. kup.

★ SEVENTY YEARS OF THE INTERNATIONAL LANGUAGE, represo de la dokumento RDC/5 de U.E.A., eldonita de Esperanto Press, Oakville, Ont., Canada; 20 paĝoj en formato: 15 × 20 cm; prezoj:

ekz.	sen kovrilo	kun kovrilo
1	0,10 dol.	0,12 dol.
5	0,40 "	0,50 "
10	0,70 "	0,85 "
25	1,50 "	1,80 "
100	5,50 "	6,60 "
1000	50,00 "	60,00 "

★ UNITARISMO — REALIGITA HOMARANISMO, kompilita kaj tradukita el la angla de Riidiger Eichholz; eldonita de Esperanto Press, Oakville, Ontario, Kanado; 60 paĝoj en formato: 15 × 21 cm; prezo: 0,75 dol.

La broŝuro konsistas el du partoj: "Kio estas unitarismo?" kaj "Paroladoj kaj artikoloj de unitaranoj".

★ SVEDUJO, turisma 14-paĝa faldfolio kun belaj kolorriĉaj ilustraĵoj kaj granda landkarto; eldonita de Svenska Turisttrafikförbundet, (Sveda Turisttrafika Asocio), Stockholm, Svedujo. Senpage havebla ĉe la supra eldoninto, sed nepre skribu en Esp. kaj indiku ke temas pri broŝuro en Esp.



S-ro Eiĵi Deguĉi elektita kiel Nova Prezidanto

La prezidanto, Isao Deguĉi, de l' Oomoto-organizaĵo abdikis prezidantecon la 1-an de aprilo 1958, kaj samdate s-ro Eiĵi Deguĉi, bofilo de s-ino Naohi Deguĉi, estis elektita kiel la nova prezidanto.

La ŝanĝo okazis tuj post kiam s-ro Eiĵi Deguĉi revenis de la mondvojaĝo, kiun li kaj lia bofrato s-ro Jasumi Hirose kune faris la lastan jaron dum naŭ monatoj (kiel raportite en Nov-Dec. de OOMOTO, 1957).

La abdikon de s-ro Isao Deguĉi devigis la ĉiam kreskantaj taskoj pro lia samtempa prezidanteco por la Universala Homama Asocio. Li de nun sin okupos ekskluzive por la por-paca agado de UHA kaj mondfederacia movado, kiun UHA subtenas, kaj aparte la mondanigo de la japanaj urboj kaj la disvastigo de la mondfederalismo.

Japanaj Vizagoj

(9) Budastatuo de Gekko-bosacu*



Malofta estas statua vizago kun tiel vivfreŝa kaj junforta vogleco kiel ĉi tiu. En ĝi estas reprezentita la forma idealo de budastatuo, kaj sekve, de homo kun plej sana korpo kaj plej pura spirito. Granda animo fidebla kaj tolerema estas sentebla en ĝi. Ĝi bone reprezentas la tre viglan spiriton de la epoko, en la fino de la 7-a jarcento, kiam ĝi estis kreita.

Cujoŝi Kobajaŝi de Nara Kultura-Trezora Instituto.
Trad. P. M.

* Bronza statuo konservata en Kondoo de Jakuŝiji Templo, Nara. Laŭlitere Gekko signifas: lunlumo.



Sanino D. M. Worcester denove en Japanujo




La angla s-anino D. M. Worcester ree alvenis la 17-an de marto ĉe la haveno de Kobe, je du kaj duona jaroj post sia unua vizito al Japanujo. Ŝia nuna vojaĝo estas laŭ la invito de Oomoto, kiun s-ro Eiĵi Deguĉi sugestis al ŝi kiam li kaj lia bofrato s-ro Hirose afable gastigis 11 tagojn ĉe ŝi en Londono dum sia mondvojaĝo 1957.

Kelkaj Kobe-anoj samtage okazigis por la jam konata angla samideanino bonvenigan kunvenon ĉe restoracio, kiun partoprenis dekelkaj samideanoj el Osaka, Kioto kaj la Oomoto-centroj en Ajabe kaj Kameoka. (Profitante la okazon, ni esprimas nian koran dankon al ĉiuj ĉeestintoj, precipe al s-roj Juri, Mijamoto kaj Haŝizume pro ilia gastama bonvenigo.)

S-ino Worcester jam estas "hejme" en Ajabe loĝante en japan-stila domo kaj

ankaŭ helpante por traduko de l' Oomoto-instruoj el Esperanto en la anglan. Krome ŝi gvidas laŭ rekta metodo la esperantan kaj anglalingvan kursojn en Ajabe kaj Kameoka. Laŭ la nuna programo ŝi havos semajnofine tri liberajn tagojn, por ke ŝi povu viziti esperantistajn aŭ aliajn grupojn en la proksimaj lokoj. La inviton de lokaj samideanoj ni bonvenigas. Ŝi ankaŭ vojaĝos tra la lando por revarnigi sian amikecon kun malproksimaj samideanoj, sed pri tio ni anoncos poste.

La Red.



La nova Banŝoden-preĝejo konstruata en Kameoka

SENPERFORTISMA ALVOKO

“Neniu ajn havas pli grandan amon ol tio, ke li donas sian vivon por siaj amikoj.” (Laŭ la evangelio de Johano, 15, 13.)

Antaŭ dek jaroj — la 30-an de Januaro 1943, Gandhi estis murdita de hindo. Liaj lastaj vortoj estis por pardon-peto favore al la murdinto. Li postulas de ĉiu ajn, kiu serĉadas la veron: Estu senperforta! Eĉ malbonon rekomencu ununure per bono, diligente laborante.

Antaŭ dumil jaroj — Jesuo, kiun la kristanoj nomas Kristo, diris: “Ekzemplon mi donis al vi, por ke vi agu, kiel mi faris al vi.”

La okcidentgermana organizaĵo, la t. n. Asocio Kontraŭ Peratomaj Difektoj, alvokas volontulojn, kiuj libervole partoprenas en persĉipa veturo en la regionojn

de la atombombaj eksperimentoj ĉe la Pacifiko.

La okcidentgermanoj ankaŭ volas pruvi, ke ili ne forgesis la mizeron, kiun kaŭzis la pasintaj mondmilitoj; ke ili ne estas pretaj preni sur sin novan kulpon. Ili volas senperforte instigi la registarojn, ke la potenculoj ĉesigu la danĝerajn eksperimentojn, ĉesigu pluan murdadon.

Ni ĉiuj estas gefratoj, kreitaĵoj de la UNU dio. Ni ne volas murdi unu la alian.

Pro tio ankaŭ nia okcidentgermana kunlaboranto jam skribis al la ĉi-supre menciita organizaĵo, ke li libervole partoprenos en tiu ŝipveturo. Li estas 51-jara, havas edzinon kaj tri gefilojn.

K. A. Metzkes*, Germanujo

* S-ro K. A. Metzkes estas direktoro por eksterlandaj aferoj de “Kampfbund Gegen Atomschaeden E. V.”, Gurggrafenstr. 52, Moenchengladbach, Rheinlando, Germanujo. Li deziras kontakton kun nepolitika esperantist(in)o en ĉiu lando, kiu honorofice perados inter lia oficejo kaj similaj ne-politikaj organizaĵoj de la koncerna lando. Germana kaj angla lingvoj kaj Esperanto uzataj.

Pri Oomoto-Redakciaj Principoj

Nenia grava ŝanĝo okazos en la redakciaj principoj de nia gazeto OOMOTO malgraŭ la ŝanĝo de la prezidanto de l' Oomoto-organizaĵo. (Oni legu la raporton sur p. 62 de ĉi tiu numero.) Kiel ĝis nun, ni publikigos laŭbezzone artikolojn pri Oomoto kaj ĝiaj instruoj, kaj dediĉos la ceterajn paĝojn por la japana kulturo, la esperantlingvaj movado kaj mondkulturo.

Lastatempe amasiĝis ĉe ni sufiĉe da originalaj kaj tradukitaj poemoj, kiujn niaj legantoj kontribuis. Ni publikigis ilin en la nuna numero tiel, ke ĝi fariĝis kvazaŭ speciala numero poezia.

La Red.

OOMOTO n-ro 213—214 (3—4月号) 昭和33年5月1日発行・購読料一年240円
編集人 中村陽子・京都府亀岡市・株式会社天声社発行・振替京都25757番

